

SANO

JARKOLEKTO 1992

NUMERO 3

ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO

SANO – jarkolekto 1992 – numero 03 - Ĉeĥa Esperanto-Asocio

Cirkulero de medicinistoj, farmacistoj, geflegistoj kaj ruĝkrucanoj kaj de tiuj, kiuj interesiĝas pri medicino

Eldonas: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, medicinista sekcio, Jilská 10, Praha 1 – kvarfoje jare kiel aldono de asocia gazeto Starto

Redaktas: MUDr Josef Hradil, Družstevní 1161, 29501 Mnichovo Hradiště 718, ĈSFR
Grafika kunlaboranto : Jiří Hanousek, Liberec

KIAMANIERE ABONI NIAN CIRKULERON ?

Vi povas mendí nian bultenon ĉe la perantoj en viaj landoj, aŭ rekte ĉe la eldonanto - Ĉeĥa Esperanto-Asocio.

Abonprezo en Ĉeĥoslovakio - 32,- Kč/jaro

Abonprezo en eksterlando - 10,50 NLG/jaro aŭ egalvaloro

PERANTOJ:

BULGARIO: Stojĉo CANKOV, p.k. 208, BG-7000 RUSE

ĈSSR: ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO, Jilská 10, 110 00 PRAHA

HUNGARIO: VIGH Lájosné, Tabnorhély ut. 4, H-1149 BUDAPEST

JAPANIO : Saburo YAMAZOE, 371 Maebashi-shi, Iwagami-Machi 4/8/9 GUNNA-KEN

POLLANDO: Helena Wegrzyn, ul. Barbary i Bogumila 15/6, PL-62-800 KALISZ

SOVETUNIO: N. SIGAJEV, Posadskaja 18-3, SU-450014 UFA

UEA : UNIVERSALA ESPERANTO_ASOCIO. Nieuwe Binenweg 179, BJ 3015 ROTTERDAM, NEDERLANDO

USA : BERN WHEEL, BOOKS, 834 WENOAH, Oak park, IL 60304

Redaktas: MUDr Josef Hradil Družstevní 1161, CS-29501 Mnichovo Hradiště ĈSFR

REFERAĴOJ

Kersting-Sommerhof B.A. aliaj: **Taksado de kameraj kompleksaj anomalioj helpe de magneta resono (MRI) A, Heart J:120,1990/1,133-142**

Kompleksaj kameraj anomalioj estas ofte ligataj al apero de abnormalaĵoj kaj sbdomena organsituo, atrioventrikla kaj vejna ligo. La studo komparas efikecon de kora angiografio kun MRI kaj ĝia bildigo de ĉiuj partoj de centra korvaza anatomio ĉe 29 malsanuloj kun kuna kamero kaj kompleta AV-kanalo. Ambaŭ metodoj estis taksataj sendepende. MRI estas same fidinda kiel angiografio ĉe bildigo de ventrikla nenormalaĵoj, morfologio, taksado de ventrikloj, situo de interventrikla septo kaj ĝia rilato al valvuloj, same kiel bildigo de disduiĝoj kaj spaca taksado de organaj vazoj. MRI plue informas nin pri brustaj kaj abdomenaj organoj kaj pulmaj arteriovejnaj ligoj. Malpligrande ĝi estis efika dum taksado de semilunaj valvuloj. Neinvadeco de ĝi estis certe avantaĝo.

Schumacher G. aliaj: **Aktuala kora katetrado kaj angiografio en infanaĝo.**

Z.Kardiologie 79,1990,5,324-325

Konsento de gepatroj pri kateterado de la infano devas esti bazita per detala informo pri speco kaj frekvenco de ĉiuj eblaj komplikaĵoj, kiujn oni spite ĉiun plenan zorgemon ne povas antaŭe ekskludi. Estas citita kompilaĵo de 462 kateteradoj ĉe 421 infanoj en la aĝo de 1 ĝis 6 jj. En kadro de tiuj kateteradoj realiĝis 24 atrioseptostomioj balonetaj kaj 5 biopsioj de kormuskolo. entute 18,2% da tiuj esploroj estis akompanataj per unu aŭ pliaj komplikaĵoj timigaj: tamen ili ne postulis kuracadon.

Morta komplikaĵo ne estis notita. La plej oftaj komplikaĵoj estis difektoj de kora ritmo, arteriaj kaj vejnaj vazaj komplikaĵoj, akuto sangoperventolado kaj spirhaltiĝo, febro kaj netolero de kontrasta substanco. risiko de tiu etoperacio tamen estas malgranda ĉe tiuj pacientoj. Tio ĉi estas konsiderata kiel sekvo de tio, ke severiĝis indikoj, altiĝis spertoj de kuracistoj, pliboniĝis kontrolo de paciento dumoperacia kaj ankaŭ diagnoza kaj terapia antaŭpreparo por tiu esploro. Spite ĉiujn tiujn faktojn necesas meznombro kalkuli kun tio, ke ĉe ĉiu kvina infano okazos tia komplikaĵo, kiu postulos adekvatan terapion.

Slavin S.A, Colen S.R. **Sesdek sinsekvaj rekonstruoj de mammo per enblobebla ekspansilo**" kritika taksado. Plast. reconstr.Surg,86,1990,5,910-919

Kvankam temas pri tralaborita kaj ŝatata metodo (kun priskribitaj biomekanikaj procedoj), estetikaj rezultoj ne estas sufiĉe referataj. Tuja rekonstruo ne donas bonajn rezultojn kaj estas taksata alte riska pro ofta haŭta nekrozo kaj prokrastita resaniĝo. Duetapa rekonstruo estas kutime triparta kun kutimaj problemoj de simetrio, ptozo kaj ekstera formo kaj oni povas fidi ĝin dum trauro de 8 monatoj.

Ĉu korpa movo ŝirmas antaŭ osteoporozo? (Fortschritte der Medizin,109,1991,4,28)

Ĉe fruaj kaj ofte neekkonataj stadioj de osteoporozo oni supozas, ke jare okazas patologia forkonstruo de osta histo en amplekso de 5%. Ofte estas la unua signo de osteoporozo nome pliparte ĉe virinoj, patologia frakturo, ofte okazanta post minimuma kaj pretervidebla incito. Ankoraŭ nedisponblas iu terapio, kiu kapablas substitui perdon de osta substanco. Tamen ekzistas almenaŭ multnombraj nerektaj incitoj, kiuj ebligas identiĝon de tiel priminacitaj personoj. Al riskaj faktoroj apartenas ĉe osteoporozo krom aliaj ankaŭ manko de movo, neĝusta nutrado kun manko da kalcio kaj vitamino D. Estas konata fakto, ke tiu ĉi malsano aperas pli ofte ĉe virinoj post menopaŭzo, ĉe kiuj malkonstruo de ostoj okazas surbaze de hormona misfunkcio. Apud hormona terapio kaj ĝusta nutrado kun abundo da albuminoj estas emfazita granda signifo de nova terapio, ĉe maljunaj personoj helpas regula trejnado ne nur restitui de osta bonstato, sed ankaŭ funkcion de sangocirkulado kaj baras ankaŭ socian izoliĝon. Ĉi tiu gimnastikado tamen devus realigata individue - ilia senco bazas en mildigo de doloroj, kiu estas klarigata per streĉo. Refreŝiĝo de skeleta muskolaro liveras al ostoj ilian originan firmecon kaj super per tio riskon de ostaj rompiĝoj ĉe tiel malsanaj unuopuloj.

Gastroduodenaj lezoj / Fortschritte der Medizin 1085,suppl94,5-9m1990

Dum longa vico da jaroj oni kredis la nediskuteblan fakton, ke acida stomaka suko estas kaŭzo de ĉiu malbono, kaj ankoraŭ en la jaro 1920 oni emfazis, ke sen acida stomaka suko ne povas estiĝi pepsina ulkuso. Tamen sinsekve montriĝis, ke la signifo de tia suko estas supertaksata, ĉar ĝia supersekretado partoprenas estiĝon de nur tri klinikaj bildoj de la malsano, nome de duodena ulkuso, refluksa ezofagito kaj rara Zollinger-Ellison sindromo. Granda pliparto da pacientoj kun stomaka ulkuso kaj kronika atrofia stomakito apartenas en grupon de "hipacidaj" unuopuloj. Studoj ĉidirektitaj montris, ke al 14 pacientoj kun hiposekrecio apartenas nur unu paciento kun supersekrecio. Sendubas, ke ĉe estiĝo de gastroduodenaj lezoj ludas sian rolon eĉ la tuta vico da aliaj faktoroj. Tio gvidis al evoluo de "la teorio de malekvivalenco". Sur unu flanko de imagita pezilo estas agresaj, kontraŭflanke protektaj faktoroj. Se ekzistas inter ili ekvivalenco, la paciento havas nenian malfacilaĵojn. Tamen se tiu ekvilibro estas misigita per stomaka acido, pepsino kaj aliaj gal-acidoj aŭ ekzogenaj noksoj kiel nikotino, alkoholo kaj influoj de ekstera medio aŭ medikamentoj, komenciĝas ĉe la paciento evoluiĝi pepsinaj lezoj. Al protektivaj faktoroj estas nun alkalkulata kreo de stomaka mucino kaj produkto de bikarbonatoj, reepiteligo kaj transangumado de stomaka epitelo. Dum ĉiuj tiaj kazoj ludas ŝlosilan rolon prostaglandinoj.

Ennaskaj koraj difektoj / NewScientists,1720,37,1990.

Surprize oni konstatis, ke tiaj difektoj aperas pliofte ĉe tiaj infanoj, kies patro estas profesia estingisto. La ĉirilataj konstatitaj faktoj estas pli grandaj ol meznombro da alia populacio. Kiel kaŭzo estas konsiderata la fakto, ke dum estingado okazas liberigo de toksinoj, kiuj forte priinfluas la estingistojn. Kanada genetikistino d-rino P. Baird el universitato de Brita Kolumbio analizis kun siaj kunlaborantoj datoj ĉe 22000 infanoj, kiuj naskiĝis en la jaroj 1952 ĝis 1972 kun ennaska

kordifekto. La rezultoj montris, ke risko ĉe infanoj de estingistoj estis 3-6foje pli alta. Genetikistoj supozas, ke tiuj laboristoj enspiras kaj resorbas per haŭto koktelon da toksaj materioj de karbonoksigeno ĝis aromaj karbonhidratoj kaj substancoj sulfurhavaj. Dume restas neklarigite, kiel tiaj nocivoj efikas ĉe la infano kaj kiel ili kaŭzas koran anomalion. Oni povas konsideri difektigon de patraj spermion kaj transporto de tiuj nocivoj per spermo al ovo. Tamen oni povas certe diri, ke estas neniu kaŭzo por paniko, ĉar la citataj datoj devenas el la tempoperiodo antaŭ la jaro 1973, kiam ne estis ordonita deva uzado de antaŭŝirmaj maskoj.

Al kiaj riskoj estas eksponitaj la kuracistoj?

D-ro Karel Daněk, ZN17/13-1992

Kiaj kuracistoj? Ni respondu rekte: norvegiaj. Ĉe ni, ĝis kiam mi scias, tian esploron neniu realigis. La gazeto de norvegia kuracista socio alportis tian raporton pri esplorado en Bergen. Temis pri komparo pri labora streĉo postulita de praktika (tiaj estis 26) kaj uzina kuracisto (17). Ili estis per antaŭa demandilo informitaj pri la principo de la problemo, pri kiu ili estos demandataj. La propra demandado estis realigita per telefono. La demandoj direktiĝis per unueca skemo, kiu enhavis la daton pri daŭro de la kuracista praktikado, plue pri ordinara taga priŝarĝo (pri ĝi vidu malsupre), uzado de telefono, rezervita tempo por tagmanĝo (ok praktikistoj - ĝeneralaj kuracistoj - kiuj nome simile kiuj ĉiuj ceteraj havis fiksitajn restadtempojn por tagmanĝo, respondis, ke por ĝi ili havas dek minutojn ol malpli; tri praktikistoj plendis, ke ili estas dum tagmanĝo interrompataj), ekipo de ilia konsultejo (proprajn komputilojn havis entute 25 kuracistoj) ktp.

Kaj nun pri propra ordinara taga laborpriŝarĝo, kiu estas tre interesa. Uzinaj kuracistoj faris tage malpli ol 8 esplorojn kaj priflegojn kaj al ĉiu el ili dediĉis 32,4 minutojn. Praktikistoj havis meznombre pli ol 22 esplorojn kaj priflegojn tage kaj por ĉiuj ili dediĉis netutajn 20 minutojn. Diversaj agadoj, kunvenoj ks. forkonsumis de uzinaj kuracistoj semajne preskaŭ 7 horojn, de praktikistoj iom pli ol unu horon. Spite ĉiuj stresigaj parametroj de laboro de uzinaj kuracistoj ne estis ili, sed la praktikistoj, kiuj supozis, ke ili restos en laboro kiel eble plej longe. Ludis ĉi tie sendube signife pli granda financa enspeza efiko ĉe praktikistoj ol ĉe uzinaj kuracistoj. Riski de labor-psika "forbruliĝo", t.e. perdo de labora elano, iniciatemo kaj priintereso, sentis mirinde pli junaj gekolegoj ol pli maljunaj kuracistoj, pli virinoj ol viroj kaj (ĉi tie jam sen miro) pli tiuj, kiuj havis pli grandan nombron da esploroj kaj priflegoj tage.

Dum tralego de tiu raporto mi malklare rememoris la tagojn antaŭ 32 jaroj, kiam mi dum gripa epidemio en iu urbeto de orienta Bohemio kvazaŭ "esploris kaj priflegis" ĝis 180 pacientojn tage, kaj ankaŭ semajnfinojn antaŭ kvarcentjaro, kiam ni dum preteca deĵoro (tiam mi laboris jam hejme en bohemia Altmontaro) dum nur parte vetureblaj ŝoseoj seninterrompe realigis vizitojn ĉe gripaj pacientoj, el kiuj pliparto bezonis nenion alian ol acilpirinon kaj konfirmon de labormalkapableco. Kelkajn vokantajn pacientojn ni atingis nur 24 horojn post ilia anonco. Kaj poste restis nur eniri la loĝejon de tia paciento kun rideta vizaĝo iom pardonpetanta kaj rakontado pri neĝamasoj surŝoseaj kaj pri tio, kie ni devis intertempe esti kaj kiel longe daŭras la vojo de sanitaŭtomobilo inter limoj de nia distrikta teritorio, kiu distancas preskaŭ 50 kilometrojn...

Terminologia kaj morala problemo: "abruptio aŭ interrompcio?"

Laŭ D-ro Aleš Novotny, Rottlach, interrompcio estas tute konfuzita termino, bedaŭrinde firme enradikiĝinta en nia literaturo kaj pensado. Tamen se ni pripensas la signifon de la vorto, ĝi estas tute misiga. Ne termpa pri interrompo kaj posta daŭrigo de gravedeco. Temas pri definitiva ĉesigo de gravedeco, de mortigo de feto, kiun poste oni ne plu povas renovigi. "Abruptio" senvole montras ĝustan signifon de la vorto, kvankam ĝi ne troviĝas en PIV. Pro tio ĉiam dum viglaj diskutoj pri longdaŭra leĝa problemo ni uzu rajte kaj ĝuste la vorton ankaŭ en kunmetaĵoj, kiel "abrupta komisiono". Kun bedaŭro ni rigardu la kolegojn, kiuj el profesiaj kaŭzoj devas fari abruptiojn. Abruptio ne estas interrompo de malagrabila stato de la gravedulino, sed ĉesigo de vivo de ankoraŭ nenaskiĝinta homa estaĵo.

Metabolismo dum gravedeco kaj inteligenteco de la infano

Neĝ Engl.J.Med.325,1991,13,911-916,

Pro klarigo, ĝis kia grado influas la metabolismo de patrino dum gravedeco konscion kaj konduton de la infano per ŝanĝo de la cerba evoluo antaŭ naskiĝo, estis observataj 223 gravedulinoj kaj iliaj

infanoj. 89 patrinoj havis diabeton sukeran jam antaŭ gravedeco, 99 havis gravedecan diabeton kaj 35 virinoj havis normalan glicidan metabolismon. Post korektoj de datoj rilate al sociekoncsia stato, raso kaj etna deveno estis indekso pritakso de menta evoluo de infanoj en aĝo de du jaroj en inversa rilato al plasmaj niveloj de beta-hidroksibutirato de la patrino ($r=-0,20$, $P=\text{malpli ol } 0,02$) kaj liberaj grasacidoj ($r=-0,27$, $P=\text{malpli ol } 0,002$) en la tria trimestro. Aliaj rilatoj ne estis signifplenaj. Diabeto dum gravedeco priinfluas konduton kaj intelektan evoluon de la infano. La rilato inter gravedeca ketonemio kaj malalta IQ de la infano emfazas neceson antaŭiri ketoacidozon ĉe ĉiuj gravedulinoj.

Morteco dependa de fumado en Usono Zschr.arzt.Rortbildung 85,1991,19,p.864

La fumado estas ankaŭ en Usono la plej ofta kaŭzo de antaŭtempa morto. En la j.1985 kaŭzis la fumado 390000 kaj en la j.1988 pli ol 430000 mortoj (dum tuteca nombro da mortoj proksimume 2 200 000 personoj). En la j. 1988 estis ankaŭ registritaj 1320 mortoj ĉe viroj-nefumantoj kaj 2485 mortoj ĉe virinoj-nefumantinoj sekve de pasiva fumado. Kvankam la prevalenco de fumado ĉe loĝantaro de Usono malaltiĝis, la nombro de mortoj kaŭzitaj de fumado dum sekvaj jaroj altiĝos. Tiu evolukurbo estas kaŭzita de nombro da fumantoj en la postmilita generacio, kiuj atingos nur nun la aĝon, kiam la sekvoj de fumado manifestiĝas. malaltiĝo de nombro da fumantoj tamen kaŭzis jam malaltiĝon de mortkazoj sekve de pulma karcinomo kaj korkrona malsano ĉe pli junaj viroj kaj virinoj.

Homoseksualeco kaj hipotalamo / Lancet338,1991,Nro8768,p.688-689

Por konstati, ĉu partoprenas antaŭa hipotalamo en gvidado de tipe vira seksuala konduto, esploris Simon Le Vay, sicenca laboranto de neŭrologia fakto en Salk-instituto en San Diego, cerban histon gajnitan dum rutinaj sekvoj de 41 personoj - 19 homoseksualaj viroj, kiuj mortis pro komplikoj de ajdeso, 16 heteroseksualoj kaj 6 heteroseksualaj virinoj. Karakteriza konstato ĉe homoseksualaj viroj estas malgranda diametro de hipotalama nukleo INAH3, kiu havas laŭ Le Vay la saman diametron ĉe virinoj kaj proksimume duonan diametron ol ĉe heteroseksualaj viroj. INAH3 estas dimorfa ne nur pro sekso sed ankaŭ pro seksa orientiĝo. La tri ceteraj nukleoj, INAH1,2, kaj 4 estas en ĉiuj tri grupoj kompareblaj. Konklude: Laŭ kompareblaj trovaĵoj de cerba histo Le Vay supozas, ke la seksa orientiĝo de homoseksualaj viroj estas enaska, kaj ne estas destinita per eksteraj influoj.

Schweiberger L.: **Artroskopiaj operacioj de genuo** / Orthopadie 19,1990,2,p.50

Apud zorgema esploro de la genuo per klasika klinika metodo, estas artroskopio de ĉi tiu artiklo konstanta parto de diagnozado de akutaj kaj kronikaj lezoj de genuo. Ĝia nuna disvolvo tamen estas kondiĉita nur de eblo de artroskopiaj operacioj. De unua artroskopia parta meniskektomio, kiu realigis Watanabe en la jaro 1962 pasis 28 jaroj. Evoluo de novaj instrumentoj ebligis realigi artroskopiajn ĥirurgian priflegon de kartilago kaj meniskoj. Pluan signifan progreson alportis en operacian artroskopion malgrandaj videokameroj kaj rotaciaj frezetoj. Videokamero ebligas observi trairon de la operacio sur monitoro ne nur al la operanto, sed ankaŭ al la flegistinoj dum prespektado de operaciaj trovaĵoj. La unua operacia frezeto estis prezentata en la j. 1975. Uzo de la rotacia frezeto rapidigas kaj simpligas kelkajn faritaĵojn. Artroskopia ĥirurgio estas teknike malfacile, ilia majstrado postulas pluan edukitaĵon. Kun multiĝantaj spertoj povas artroskopisto dediĉiĝi al pli postulemaj teknikoj (suturo de menisko, rekonstruo de kruciĝantaj ligamentoj, sinovektomio ka.) kaj al problemoj de priflego de kartilago kaj artikaj kontaktareoj. Tamen tiu fascina tekniko devas esti uzata tre singardeme, por ke ĝi meme ne gvidu la pluajn interartikaj lezoj.

Lanzer W.L. Komenda G. **Ŝanĝoj de kartilago post meniskektomio** / Clin. Orthop. 252,1990,p.41-48

La menisko estas ofte taksata kiel evolua rudimento. Tamen parta aŭ totala forigo de menisko malhelpas la biomekanikajn kaj fiziologiajn procedojn de la genua artiklo. Kvankam patogenezo de osteoartrozo estas nekonata, estis konstata plialtigita metabolisma renverso de la kartilago post meniskektomio, kiu konservas mekanikan integriĝon de la kartilago. Krome povas en degenerativaj ŝanĝoj transformiĝi inflama proceso ene de la artiklo de la genuo, kiu povas multigi homeostazajn,

anabolismajn kaj katabolismajn procesojn, protektantajn la genion. Eksperimentoj je laboratoriaj bestoj montras nur lokan kaj relative malrapidan degeneron kompare al la homo. Osteoartroza degenero post meniskektomio kutimas estis priskribita histologie kiel fibriliĝo, ŝveliĝo, fisuroj, ĉela proliferiĝo, kungrupiĝo de ĉeloj kaj fine kiel nekrozo. Biokemiaj ŝanĝoj sumigas perdon de proteoglikano, disfalon de strukturo de la proteoglikano kaj altiĝintan sintezon de la proteoglikano. Krome plinombriĝintaj hidratiĝintaj fibroj de kolageno de tipo II estas eksponitaj al plimultiĝintaj biomekanikaj fortoj. Malgranda kolageno, t.e. tipo IX, povas ludi rolon en stabiliĝo de proteoglikana interagado de la tipo II, kiu certigas mekanikan stabilecon. Tio signifas, ke meniskektomio kaŭzas multe pli da ŝanĝoj, ol estas artikito kaŭzigata de forfrotiĝo kun fendetoj.

Glinz: **Pledo por reartroskopio** / Artroskopio 3,1991,nro 1/47/48

Komence de "artroskopia erao" neniu kuraĝis dubi pri fidindeco de trovitaĵoj, konstatitaj dum artroskopio. troviĝis neniu ĥirurgo, kiu realigus artrotomion de genuo ĉe paciento, ĉe kiu estis artroskopia eliminigita rupturo de menisko. Estis konstatite, ke diagnoza artroskopio estas por diferencigo de intraartikulaj difektoj pli fidinda ol artrotomio. Artroskopio ŝajnis esti preskaŭ senerara kaj validis kiel "ora standardo" dum pritakso de la fidindeco de aliaj diagnozaj metodoj. Hodiaŭ estas sciata, ke en diagnozado povas esti pretervidataj eĉ signifaj patologiaj statoj. Tuj post finskribo de operacia protokolo pri artroskopio estas forgesataj malfacilaĵoj, kiuj akompanis dumoperacian taksadon. Se malfacilaĵoj postrestas kaj se realiĝas reartroskopio, kutimas diferencoj en duono da kazoj la taksado de la unua rezulto. Sendubas, ke ofte nesufiĉa bonvolo por reartroskopio estas psikologia problemo. Eĉ post negativa artroskopio aŭ post diagnoza operacio, dum kiu ne estis konstatita kaŭzo de malfacilaĵoj, ne povas elimini intraartikulan kaŭzon de malfacilaĵoj. Laŭ spertoj estas sciata, ke konvene indikita reartroskopio post negativa diagnoza artroskopio aŭ post artroskopia faritaĵo estas por la paciento eksterordinare profitdona. Ĉe pacientoj post operaciaj faritaĵoj helpas reartroskopio dum pritakso de uzita operacia tekniko. Se klinika trauro post artroskopia operacio signife malpliboniĝas ol ni povus atendi laŭ la operacia trovitaĵo, ni ne devus tro longe reartroskopion forŝovi kaj longe ĝisatendi pli longe ol 4-6 monatoj. reartroskopio devus esti realigita dum plej favoraj kondiĉoj - en tutkorpa anestezio de sperta artroskopisto. Bedaŭrinde pliparto da pacientoj frustritaj pro malbona rezulto de artroskopia operacio, elserĉas helpon ĉe fame konata artroskopisto. Per tio perdiĝas eblo de memkontrolo de origine operaciinta kuracisto kaj eblo de pritakso de propra operacia tekniko. Pro tio estas bone la pacienton inviti por regulaj kontroloj kaj dum kontroloj alligi lian fidon.

Smith. J. / **Artroskopia kuracado de purulenta genuito** / Artroskopy2,1986,1,30=34. Pusa genuito estis kuracita per artroskopia evakuo de puso kaj enkonduko de lavaĵo ĉe 30 pacientoj. En ĉiuj kazoj ĝi estos alplenigita per perbuŝa aŭ parenterala apliko de antibiotikoj. Estis observitaj 21 viroj kaj 9 virinoj. Por tiu maniero de kuracado estis elektitaj pacientoj de aĝo de 6 monatoj ĝis 65 jaraĝaj. Ĉe 22 el ili estis la origino hematogena kaj ĉe 8 tion kaŭzis penetra vundo de genuo. Ĉe 2 pacientoj daŭris la malsano semajnon antaŭ priflego. Observado post operacio daŭris de 6 monatoj ĝis 5 jaroj en 20 kazoj estis kultivita stafilokokoko ora, streptokokus penumoniae 3, str. influencae 4, heiseria gonorea 1. Meztempa hospitaligo ĉe infanoj ĝis 12jj estis 3,5 tagoj kaj ĉe ceteraj pacientoj 9,5 tagoj. Ĉe 3 malsanuloj kun diabeto, rena malsufiĉeco aŭ alia akompana malsano estis meznombra daŭro de hospitaligo 17,3 tagoj. Eminenta rezulto estos observita ĉe 28 pacientoj (93,3%). Bona rezulto estis ĉe 2 (6,7%). Ne estis observitaj malbonaj rezultoj aŭ recidivoj. Aperis eĉ neniam osteomjelitoj. Ĉi tiu metodo signife mallongigas hospitaligon kaj signife malaltigas malsanecon

Siegel R.J./ **Perhaŭta ultrasona angioplastiko**: Unuaj klinikaj spertoj. Lancet 1989,8666/2,p.772-774

Per transhaŭta de katetero transportita energio esti uzita por rekanaligo de arterio ĉe 8 pacientoj kiu suferis pro periferia arteria ŝtopiĝo. Kvar el pacientoj havis kompletan okluzion kun gravaj klaŭdikacioj, pluaj kvar havis gravan stenozon de supraĵa femora aŭ poplitea arterioj. Estis uzita prototipo de ultrasona sondo kun frekvenco 20 kHz kaj efiko 20-35W/cm², kiu estis enmuntita en 7F kateteron kaj enŝovita dum angiografaj kontrolo en lokon de okluzio. Tri el kvar kompletaj

okluzioj estis rekanaligitaj dum 120 sec aŭ pli frue. Resta stenozo havis diametron 54%. Ultrasona energio malgrandigis diametron de izolita stenozo el 77% al 37%. Ĉiuj lezoj estis plue kuracataj per baloneta angioplastiko; rezultis 20% rezidua stenozo. Estis konstatita neniu arteria emboligo, disekcio, spasma aŭ perforacio. Per transhaŭta katetero transportita ultrasona energio ŝajnas esti promesa por sekura kaj efika eluzo dum kuracado de aterosklerozo de periferiaj arterioj, efikas per plibonigo de amplekso de arteria malvasteco kaj povas rekanaligi totalan arterian obstrukcon.

Henassge E.J. aliaj: **Pritrakto de lumbaj doloroj** - Chir. Praksis 42,1990,3,503=510

Kaŭzoj de kronikaj doloroj de lumbo estas

1. nestabileco de vertebraro - kaŭzo mekanika
2. lezo de artikoj - kaŭzo artikogena
3. stenozo de vertebrara kanalo - kaŭzo neŭrogena

Kronikaj lumbaj doloroj povas aperi post malfermo de vertebrara kanalo. Cikatrika histo entiras duron al mjelaj radikoj kaj strangolas. Post forigo de pulpa nukleo estas movsegmento nestabila kaj tio kaŭzas lumbajn dolorojn. Statika ŝarĝo ŝoviĝas dorsdirekte, okazas pligrandiĝo de premo sur artikajn kunigojn de vertebrajn arkoj kaj platiĝo de lumba lordozo. Ĉer malsanuloj operaciitaj pro protuzo de disko oni devas kalkuli kun lumbodoloroj ĉe minimume 10% da pacientoj. Tial devas esti operacio severe indikita. Kune kun aliaj kriterioj devas estis plenumita ĉeesto de almenaŭ tri neŭrologiaj defecitoj: 3-4 semajnojn daŭranta nesukcesa kuracado, doloroj envicigeblaj sub nocio radikulito, difekto de sensibleco en la sama dermatomo, motoriaj difektoj de lezita nerva radiklo, malfortiĝinta reflekso de la trafita nerva radiklo, doloro dum streĉo de la nervo, mjelografate aŭ CT-pruvita prolapso de analogia neŭrologia defecito. Kuracado: medikamenta, estas kompletigata per koanalgeziloj, al kiuj apartenas antidepresiloj, kalcitonino, neŭroleptikiloj, antikonvulziloj. Lokaj kaj konduktaj anesteziiloj havas krom efiko kuraca ankaŭ diagnozan signifon. Pluaj helpiloj: korseto, zono, bandaĵo por stabiligo de segmentoj, tracia rehabilitado kun moviga terapio, ĥioplaktikado. Ĉe malvastiĝo de vertebra kanalo sub 10mm estas absolute indikita dekompresio.

Aplikado de varmo en diversaj formoj. transhaŭta stimuligo de nervoj. Dum diagnozado estis farita decida paŝo per novaj bildigaj metodoj, ĉefe CT. Grave estas Fari zorgeman anamnezon, eligi spondiliton, destrucion per tumoroj kaj osteoporozon.

Olthoff K.M. aliaj: **Kia estas la loko de hepata transplantado en terapio de hepataj neoplasmaj?** Arch. Surg.125,1990,10,1261-1268.

Dum la jaroj 1984-1989 realiĝis en amerikaj UCLA School of Medicine 28 ortotopikaj transplantadoj de hepato, indikitaj pro maligna malsaniĝo. Antaŭoperacia diagnozo" hepatoĉela karcinomo (16), ĥolangiokarcinomo (3), pluaj primaraj tumoroj de hepato (3). Transvivis post 6 monatoj 67,3%, post 1 jaro 51% kaj 31%. Tri pacientoj transvivis pli longe ol 5jj. Konstato de recidivoj ĉe pacientoj transvivantaj pli ol tri monatoj estis 48% (meze 7 monatoj). Ĉe hepatoĉela karcinomo kaj ĥolangiokarcinomo estis la plej malbonaj nombroj de transvivo kaj la plej alta konstato de recidivoj. Ne estis konstatitaj specifaj prognozaj faktoroj. Laŭ la rezulto de la studo oni povas dedukti, ke ortotopika transplantado de hepato povas certigi longdaŭran pliboniĝon kaj pliativon de maligna proceso - por taksado de rezultoj tamen estas ege grava elekto de pacientoj. Ortotopika transplantado de hepato ĉe pacientoj kun malignaj tumoroj de hepato restas malfacila kaj kontraŭdira problemo. Por ke oni povu antaŭdiri efikecon de transplantado, necesas taksati rezultojn de vico da klinikaj centroj. La aŭtoroj mencias dinitaĵojn de Eŭropa registro de hepatotransplantadoj. Tuteca valoro de transvivo ĉe ĉiuj tipoj de hepataj malignaj tumoroj post 3jj estas inter 20-40%. Konstato de recidivoj estas inter 37-65%. La aŭtoroj resumas rezultojn de unuopaj tipoj de tumoroj en diversaj klinikaj centroj.

Nuntempe estas menciitaj ĉi tiuj kontraŭindikoj de kortransplanto:

1. HIV-infekto
2. progresintaj sistemaj malsaniĝoj
3. antaŭ nelonge travivita tumora malsano
4. fiksita grava pulma hipertensio

5. nekontrolebla infekto

6. narkomanio

INFORMOJ

Japana registraro staras antaŭ nesolvebla ŝoko de la lastaj jaroj. Nome statistikoj konstatis, ke Japanio havas per 1,57 naskoj ĉe virinoj de fertila aĝo la plej malgrandan kvoton de naskoj en la tuta mondo. En la jaro 1979 faris tiu ĉi donitaĵo ankoraŭ 1,77, en la jaro 1949 4,54. Ĉi tiu "naska striko" bildigas opiniojn de nuntempaj japaninoj, el kiuj nur 31% konfesas la tradician formon de edzeco kaj eduko, dum kio 40% el ili deziras plengustumi ĉiujn vivĝojn kaj nur post pensi pri ekzeco kaj infanoj.

Pli ol 90% el anglaj pacientoj kun akuta infarkto de kormuskolo ricevas regule kiel unuan medikamenton acilpirinon, nome antaŭ hospitaligo. Anglaj kardiologoj taksas acilpirinon dum suspekto IV kiel obligata komenca terapio.

Dum olimpikaj ludoj en Seulo estis starigita t.n. "dopinga statuto", en kiu ni trovas stimulojn, narkotikojn, anabolikojn kaj steroidojn, beta/blokilojn kaj diuretikojn. Vitameno C ne apartenas inter malpromesitajn medikamentojn, tamen ĝi nur nun komencas ludi sian rolon, precipe ĉe biciklistoj. Biciklistaj profesiuloj nome "eksciis" de laborantoj-kemiistoj, ke vitamino C (kaj same tiel granda dozo de citrona suko) rapidigas eligon de dopingiloj el organismo.

Ĉinia vilaĝo Gaoiang en provinco Fujisan fariĝis mistero por la sciencista mondo. Nome montriĝis, ke dum la lastaj 40 jaroj naskiĝis en la vilaĝo 136 infanoj, tamen el ili nur 11 knaboj. Ek de la jaro 1974 naskiĝis tie eĉ neniu knabo. La loĝantaro de la vilaĝo estis detale medicine esplorita, tamen oni trovis nenion, per kio ĝi diferenciĝus de la najbara vilaĝo, distancita nur 1 kilometron. Ĉe tiuj najbaroj la rilato de sekso de novnaskitoj estas tute normala.

Laŭ sciigo de UNICEF mortas en landoj de la tria mondo tage 40 mil infanoj pro malsato aŭ malsanoj, kiujn oni povus per vakcinado aŭ kuracado per malmultekostaj medikamentoj facile sanigi. Nur 2 ĝis 3 milionoj dolaroj sufiĉus por savo de duono de tiuj infanoj. Montriĝas ankaŭ, ke signife malboniĝis ebloj ekde baza edukeco de tiuj infanoj. En ĉiu dua evolulando malkreskas la nombro de lernejinfanoj inter 6 kaj 11 jaraĝo.

En la jaro 1987 eldonis 13 eŭropaj landoj, inter ili Italio, Portugalio, Norvegio, Islando kaj Suomio, malpermeson de cigareda reklamo. Franca registraro preparas por la 1-a de januaro 1993 absolutan malpermeson de tabakaj produktoj. Tamen tiu malpermeso estos tiel severa, ke neniu frimao, produktanta tabakaj produktoj, povos plu propagandi fumadon, ekzemple eĉ ne en formo de surgluaĵoj sur kofroj, vestoj ktp. La produktantoj de tabako ne povos ankaŭ sponsori kiujn ajn sportan aŭ kulturan aktivecon. Ĉiu pakaĵeto da cigaredoj devige enhavos informojn pri malhelpaj efikoj de fumado por sano de la homo. Prepariĝas ankaŭ vastefika malpermeso de fumado en publikaj spacoj.

Grandan atenton de transplantaj ĥirurgoj kaŭzis la sciigo, ke la japana firmao Fujisawa evoluis antibiotikon de provizora nomo PK506, kiu havas dum reĵeta reago de transplanto tiel bonajn efikojn, ke ĝi povus konkurenci al ĝisnuna Ciklosporino A, kiu havas kelkajn apudajn ne deziratajn efikojn.

Laŭ amerikaj statistikoj prezentas bronka astmo ĉe infanoj kaj gejunuloj ĝis 18jaraĝaj unu el la plej disvastiĝintaj malsanoj. Ĝi trafas en Usono proksimume 3,2 milionoj da infanoj. Ek de la jaro 1970 la nombro daŭre kreskas. Ĉiu el tri astmuloj en la lando estas junulo. Inter la malsanuloj prevalas knaboj. Estis ankaŭ konstatite, ke kreskas la nombro da mortoj pro astmo.

Scientistoj en universitato en Charlottesville en Virginio izolis el spermato albuminan molekulon SP-10, kiu povus ĉe virino post unu injekto provoki produkton de antigenoj "frostigantaj" spermiojn en ovidukto. Tiu tute originala metodo de antikoncipado estos testita dum estontaj du jaroj je pavianoj.

Laŭ amerikaj studoj prezentas ŝoforoj, kiuj suferas pro sukera diabeto aŭ epilepsio, grupon, kiu kompare al sanaj ŝoforoj montras nur tro etan grandigon de risko de trafikaj averioj. Kelkaj severaj

aranĝoj, se temas pri kapablo de ŝoforado, tamen ne rajtas.

Laŭ lastaj sciigoj la nombro da gajnitaj lezoj de haŭto (ekzemple profesiaj) kaj alergioj kreskas tiel rapide, ke sen troigo oni povas diri, ke la haŭto perdas sian signifon "de natura defenda ŝildo". Signife kreskas eĉ nombro da alergiuloj-atopikuloj, nome de personoj, kiuj sian alergian emon alportas en mondon dum sia nasko en hereda materialo. Proksimume eĉ 15% da hospitaligitaj pacientoj dum kuracado evoluigas alergio kontraŭ la uzitaj medikamentoj; potencialaj materioj povas esti eĉ tiaj biologiaj materialoj, kia estas propolis, kamilo aŭ arniko.

Karaj gekolegoj,

nia multjara senprofita agado estus vana, se ni ne sukcesus disvastigi nian lingvon en ĝeneralan uzon, precipe inter sciencistoj. Multaj pensas, ke nun estas tute sentuile propagandi Esperanton, dum la angla gajnas pozicion per rapida disvastigo en postkomunistaj landoj. Male: kun kresko de la nombro de finstudintoj de la angla kreskas ankaŭ nombro de tiuj, kiuj ne kapablas finlerni ĝin el diversaj kaŭzoj, precipe pro ĝia malfacileco kaj kontaktante Esperanton aprezas ĉiujn avantaĝojn de nia internacia lingvo. Premo de ofensivo de la angla provoku kontraŭpremon de ŝatantoj de internacia lingvo. Ni fortigu nian klopodon racie pensante atentigi senperforte pri Esperanto. Kiel Per sistema lernado, persona interkontaktado interkolega, legado kaj propagando de ĝia gazeraro faka: SANO, Meidcina Kuriero kaj Internacia medicina Revuo.

Český esperantský svaz
110 00 PRAHA 1, Jilská 10

NOVINY

Dohlédací pošta Praha 07
Snížený poštovní poplatek povolen
Ředitelstvem pošt Praha
J. ZN. P/1-1267/79 ze dne 6.4.1979